# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-11-07 n-ro 348

# Germanio: Manifestacio en Bonno antaŭ la COP23



27 homoj mortigitaj en preĝeja amaspafado en usona ŝtato Teksaso

Bombatako mortigis 75 homojn en Deir ez-Zor de Sirio

Elpelita kataluna gvidanto Puigdemont liberigita sub kondiĉoj en Belgio

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Germanio: Manifestacio en Bonno antaŭ la COP23
*Konkretaj agoj por lukti kontraŭ la klimata varmiĝo p. 03*

27 homoj mortigitaj en preĝeja amaspafado en usona ŝtato Teksaso
*En la urbeto Sutherland Springs p. 03*

Bombatako mortigis 75 homojn en *Deir ez-Zor* de Sirio
*Ekstremistoj de la Islama Ŝtato p. 04*

Elpelita kataluna gvidanto Puigdemont liberigita sub kondiĉoj en Belgio
*Li ne serĉas politikan azilon p. 04*

Reto de ŝargstacioj por Eŭropo
*Rapidŝargaj stacioj por elektraj aŭtomobiloj p. 05*

Maloftaĵo – la ĝemeloj kiuj ne estas fratoj
*Superembriiĝo aŭ superfetiĝo p. 06*

Hodiaŭe
*Albert Camus; Fritz Reuter; Benny Andersen; Karel Jaromír Erben; Rafael Pombo; kaj Papilio p. 06*

# Germanio: Manifestacio en Bonno antaŭ la COP23

Miloj da personoj amasiĝis sabaton [04 nov 2017] sur la stratoj de Bonno, eks-ĉefurbo de Federala Germanio, 48 horojn antaŭ la malfermo de la COP23.




La manifestaciantoj postulis konkretajn agojn por lukti kontraŭ la klimata varmiĝo post la Pariza akordo adoptita fine de 2015.

Aparte akuzata de la aktivuloj estas la karboekspluatado, la plej detrua fosilia energio por la naturmedio.

Laŭ Jana ALJETS, proparolanto de la grupo «*Ende Gelände*»: «La internaciaj registaroj kaj la ŝtatoj ne faris sufiĉe, tute ne -, nenion faris por protekti la klimaton, aparte la germana registaro. Tio estos ebla, nur kiam ni haltigos la karboekspluatadon. Pro tio, ni okupas lignitminon por haltigi la detruadon, kie ĝi komenciĝas».

La manifestaciantoj intencas fari premon sur la delegitoj de ĉirkaŭ 200 landoj, kiuj kunsidos en Bonno, ĝis la 17a de novembro por la 23a konferenco de UN pri la klimato.

Usono partoprenos en la laboroj, malgraŭ sia eksiĝo el la Pariza akordo decidite de Donald TRUMP.

Neniam Milito Inter Ni

# 27 homoj mortigitaj en preĝeja amaspafado en usona ŝtato Teksaso

Loka polico konfirmis, ke dimanĉe amaspafado en preĝejo de la urbeto *Sutherland Springs* en suda Teksaso de Usono mortigis almenaŭ 27 homojn kaj vundis plurajn aliajn. La polico mortpafis la atakanton en la preĝejo.



Vidinto diris al amaskomunikiloj, ke je la 11a horo kaj 30 minutoj antaŭtagmeze unu viro eniris la preĝejon kaj ekpafis al homoj. Savantoj kaj helikoptero atingis la okazejon, kaj la vunditoj estis transigitaj al proksima hospitalo.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Bombatako mortigis 75 homojn en *Deir ez-Zor* de Sirio

Monitora grupo raportis dimanĉe [05 nov 2017], ke suicida bombatako efektivigita de ekstremistoj de la Islama Ŝtato en la siria orienta provinco *Deir ez-Zor* mortigis 75 homojn kaj vundis 140 aliajn.



La Siria Observo pri Homaj Rajtoj diris, ke inter la mortintoj pro la eksplodo, kiu okazis sabate vespere sur la orienta bordo de la rivero Eŭfrato en *Deir ez-Zor*, estis ankaŭ infanoj.

La grupo, kies stabejo troviĝas en Britio, diris, ke la eksplodo skuis la straton *Tujar* inter la gaskampo Conoco kaj la elektraj centraloj *Jafra* en la orienta provinco *Deir ez-Zor*.

Ĝi aldonis, ke multaj homoj fuĝis al la dezerta regiono post la eksplodoj efektivigitaj de la grupo Islama Ŝtato.

Post la eksplodo, la vojo estis fermita kaj la prezoj de ĉiuj manĝaĵoj triobliĝis en regionoj sub la regado de la Islama Ŝtato.

La regionoj sur la orienta bordo de Eŭfrato estas plejparte regataj de la siriaj demokratiaj fortoj subtenataj de Usono, kiuj avancas al tiu regiono kontraŭ la Islama Ŝtato.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Elpelita kataluna gvidanto PUIGDEMONT liberigita sub kondiĉoj en Belgio

Lokaj amaskomunikiloj raportis dimanĉe vespere, ke la belga antaŭesplora juĝisto liberigis sub kondiĉoj elpelitan katalunan gvidanton Carles PUIGDEMONT [i Casamajó ] ['karɫəs pudʒdə'mon i kazəmə'ʒo] kaj kvar eksajn membrojn de lia kabineto, kiuj sin prezentis al la belga polico dimanĉe [05 nov 2017] matene.



Laŭ Paul BEKAERT, belga advokato de PUIGDEMONT, ili ne povas iri el la belga teritorio sen interkonsento de la antaŭesplora juĝisto, devas loĝi ĉe fiksita adreso kaj prezenti sin al ĉiuj proceduroj aŭ al ĉiuj kunvokoj de la juĝaj kaj policaj aŭtoritatoj.

PUIGDEMONT kaj la kvar eksaj membroj de lia registaro estas akuzitaj de la hispana registaro, same kiel la aliaj ok eksaj membroj de la kabineto, pri ribelo, ribelintenco kaj malversacio de publikaj fondusoj post la unuflanka deklaro de sendependeco de la regiono en la 1a de oktobro.

La kvin homoj atingis Bruselon en la 30a de oktobro, kaj PUIGDEMONT diris en gazetara konferenco en la sekva tago, ke li ne serĉas politikan azilon en Belgio.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Reto de ŝargstacioj por Eŭropo

La reto de ŝargstacioj por Eŭropo kiun planas la germana aŭtomobila industrio pli kaj pli realiĝas. Ankoraŭ ĉi-jare ekzemple en Aŭstrio disponeblos la unuaj rapidŝargaj stacioj por elektraj aŭtomobiloj.




La starigo de la unuaj 20 de entute 400 planitaj rapidŝargaj stacioj ĉe aŭtoŝoseoj kaj laŭlonge de aliaj ĉefaj trafikaksoj komenciĝos en Germanio, Norvegio kaj Aŭstrio. Pri tio informis la partoprenantaj germanaj aŭtomobilkonstruantaj entreprenoj lastvendrede [03 nov 2017].

La stacioj havu inter si distancon de 120 kilometroj kaj disponu ĉiam pri pluraj ŝargaŭtomatoj. Laŭ la indikoj la unuaj 20 stacioj konstruiĝas kunlabore kun funkciiga entrepreno de aŭtoŝoseaj ripozejoj, kun aŭstra mineralolea konzerno kaj kun komerca ĉeno kiu ankaŭ mastrumas benzinstaciojn. Oni intencas starigi pluajn ŝargstaciojn post tiuj unuaj 20.

Dum la venonta jaro la nombro kresku al pli ol 100, ĝis la jaro 2020 tiam estu disponeblaj ĉiuj 400 ŝargstacioj. La plivastigo de produktiva infrastrukturo por la ŝargado de elektraj aŭtomobiloj estas konsiderata esenca antaŭkondiĉo por tio ke pli da homoj decidos uzi elektran aŭtomobilon.

En la entrepreno kiu estis fondita por la realigo de la ŝargstacia reto partoprenas kvar konzernoj je po unu kvarono. La sidejo de la firmao troviĝas en Munkeno kaj oni okupos unuavide proksimume 50 kunlaborantojn. Rilate al la investota sumo la koncernaj entreprenoj ne donis indikojn.

Per la unua tuteŭropa reto de ŝargstacioj la elektraj aŭtomobiloj fariĝos taŭgaj por longaj distancoj, klarigas la afergvidanto de la nova entrepreno. "La fondiĝo de nia entrepreno estas grava mejloŝtono kiu montras ke la aŭtomobilkonstruantoj kunigas siajn fortojn tiucele."

La aŭtomobilkonstruantoj tiel kreas gravan antaŭkondiĉon por ke la multaj modeloj de elektraj aŭtomobiloj kiuj laŭ iliaj anoncoj aperos dum la venonta jardeko, trovu uzantojn. La problemo pri "kokino-ovo", ke elektraj aŭtomobiloj ne povus fariĝi amasa produkto sen ŝargstacia infrastrukturo, kaj ke aliflanke la aŭtomobilkonstruantoj pro mankantaj ŝargstacioj hezitus disvolvi elektrajn aŭtomobilojn, tiel estos solvita. La usona elektra pioniro *Tesla* jam antaŭ ili decidis prefere mem konstrui ŝargstaciojn anstataŭ atendi ŝtatajn investojn en la infrastrukturon.

Ĉe la ŝargaŭtomatoj de la nova germana entrepreno la baterioj povos esti reŝargataj per produktivo de ĝis 350 KWh - sendepende de markoj danke al unueca konektilo. Antaŭ apenaŭ unu jaro oni anoncis tiurilate ke la ŝargado ne daŭru pli longe ol kafopaŭzo. La aŭtomobilkonstruantaj entreprenoj vetas pri tio ke ankoraŭ pluaj produktantoj de elektraj aŭtomobiloj aliĝos al la komuna entrepreno.

Esperanta Retradio

# Maloftaĵo – la ĝemeloj kiuj ne estas fratoj

Lupatrino (luita patrino, anstataŭiga patrino) estas tiu fekundema virino, kiu naskas infanon por alia persono aŭ paro, portas, vivnutras en sia korpo ilian feton (do, "luas" sian uteron).




Pasintjare en Kalifornio, Usono, ĉina paro kontraktis Jessica ALLEN kiel lupatrinon. Tuj post la akuŝo, dunaskitojn ŝi transdonis al la paro, sed poste ŝi malkovris, ke unu el ili estas gene ŝia propra ido.

ALLEN asertas, ke ŝi ne rigardis la infanojn je la akuŝo, okazinta decembre 2016, kaj post kelkaj semajnoj la ĉina paro sendis al ŝi fotojn de la dunaskitoj, kaj ili demandis "Tiuj infanoj ne similas, ĉu?". "Mi tuj teruriĝis, pripensante: kiamaniere tio okazis?", tion ŝi diris.

Post DNA-analizo estis konfirmita la patrineco de ALLEN je unu infano. Do oni malkovris, ke ŝi estis trafita de malofta fenomeno nomata superembriiĝo aŭ superfetiĝo, kiu estas la fekundiĝo de dua ovolo dum graveda periodo.

Resume: post monatoj kaj kadre de juĝaferoj, ALLEN sukcesis pri la gardo de la infano, kiu nun estas 10-monataĝa.

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog



## Albert CAMUS

**Albert CAMUS [Albèr Kamu], en Esperanto Alberto KAMUSO (naskiĝis la 7-an de novembro 1913, mortis la 4-an de januaro 1960) estis franca verkisto kaj filozofo. Li estis nobelpremiito en 1957.**

**En Esperanto aperis: *La fremdulo; La justuloj; Letero al alĝeria aktivulo*.**

**Vikipedio**

## Fritz REUTER



**Fritz REUTER (fakte Heinrich Ludwig Christian Friedrich REUTER; * la 7-an de novembro 1810 en *Stavenhagen*; † la 12-an de julio 1874 en *Eisenach*) estas inter la plej signifaj verkistoj en la platgermana lingvo.**

**En Esperanto aperis: *Kio povas okazi, se oni donacas surprize*.**

**Vikipedio**



## Benny ANDERSEN

**Benny ANDERSEN (naskiĝinta la 7-an de novembro 1929) estas dana poeto, verkisto, komponisto kaj pianisto. Li verkis poemojn, eseojn, romanojn, novelojn kaj infanlibrojn. Liaj verkoj estas inter la plej legataj kaj kantataj lirikaĵoj de la moderna dana literaturo.**

**En Esperanto aperis: *Al la aŭtuno; Boneco; Feliĉa tago de Svante; Oni iom idiotas*.**

**Vikipedio**

---

## Karel Jaromír ERBEN



**Karel Jaromír ERBEN (naskiĝis la 7-an de novembro 1811 en *Miletín*; mortis la 21-an de novembro 1870 en Prago) estis ĉeĥa poeto kaj historiisto, la unua arkivisto de la urbo Prago.**

**En Esperanto aperis: *Ĉemizoj por edziĝa festo; Bukedo el ĉeĥaj naciaj mitoj; Kristnaska tago*.**

**Vikipedio**

---




## Rafael POMBO

**Rafael POMBO estis kolombia poeto, ĵurnalisto kaj tradukisto, naskiĝinta la 7an de novembro 1833 en Bogoto, kaj mortinta en la sama urbo la 5an de majo 1912. Estis li unu el la plej fruktodonaj el la poetoj de sia lando, reprezentanto de la Romantikismo, kvankam populare en Kolombio li estas eble pli konata pro sia porinfana literaturo.**

**Vikipedio**

---



## Bildo de la tago

**Papilio *polytes Linnaeus.***

**Vikipedio**